

# LA JUNANA VIVO



REDAKCIO KAJ  
ADMINISTRADO:  
WEST-GRAFTDIJK  
(M.H.) NEDERLANDO  
GIRONUMERO 209354 NEDERL.

JARABONO:  
NEDERLANDO:  
0,80 GULDENO  
ALIAJ LANDOJ:  
16 FR.FR.; 0,70 DOL.; 2,15V.FR.

EHEVGM

## MONATA ORGANO POR LA JUNULARO KAJ KOMENCANTOJ

Por progresintoj.

### PAŝTISTA KNABO. (Orienta rakonto)

Abbas la Granda, reĝo de Persio, iam dum ĉasado vojeraris. Jen li aŭdis de malproksime tonojn de fluto. Li direktis sin tien kaj venis sur herbejo, kie paŝtista knabo gaje ludis sian fluton kaj samtempe atentis pri sia brutaro. Ekvidante la fremdan sinjoron, la knabo ĉesis la ludadon. Sed la reĝo aliris lin kaj petis pri nova melodio. Kaj la knabo ekblovis kaj kiam li finis, la reĝo demandis, kiu li estas kaj kie li loĝas. La knabo diris, ke liaj gepatroj ne plu vivas, ke li loĝas ĉe iu parenco kaj ke li jam kiel malgranda knabo iris kun la ŝafoj al la kampo.

Al la reĝo plaĉis la sincera vizaĝo de la knabo. Li faris diversajn demandojn kaj la knabo respondis tiom bone, ke la reĝo pensis: „Nu, tia knabo, kiu ĉiam nur kun la ŝafoj vivis, kaj tamen donas tiajn respondojn, certe estas eksterordinara infano; el li kreskos brava viro.”

Jen alproksimiĝis la grandveziro, kiu ĉie serĉis la reĝon.

„Grandveziro,” diris reĝo Abbas, „diru al mi, ĉu plaĉas al vi ĉi tiu knabo.”

La grandveziro venis apude; la reĝo ree faris diversajn demandojn, kaj la respondoj estis tiaj, ke la reĝo kaj la grandveziro ambaŭ miris.

Kaj la reĝo decidis kunpreni la knabon kaj klerigi lin en la granda urbo.

La knabo venis al la granda urbo, la plej bonaj instruistoj edukis lin kaj li fariĝis viro, riĉa je kono kaj riĉa je virtoj, kaj la reĝo pli kaj pli amis lin. Li nomis lin Ali kaj faris lin trezoristo.

Kaj Ali vivis kiel viro, kiun oni nenion povas riproĉi, li bone

zorgis pri la trezoroj de la reĝo, estis malavara por la malriĉuloj kaj kompleza al ĉiuj homoj, malgraŭ tio, ke li estis la favorato de la reĝo.

Kio lin apartigis de la persaj korteganoj, tio estis lia neprofitemo : neniam li pagigis al si pro faritaj servoj. Lia plej granda plezuro estis helpi la proksimulojn.

Prospero kaŭzas envion! Tion ankaŭ Ali spertis. La aliaj korteganoj ne povis toleri, ke li, simpla paŝtisteto, altiĝis al tiom alta ofico. Ili ĉiel klopodis suspektigi lin ĉe la reĝo. Sed reĝo Abbas estis nobla viro; li tre bone konis sian noblan, sinceran trezoriston kaj ĉiujn suspektigojn de la enviantoj li ignoris.

Sed mortis la granda reĝo, kaj lia posteulo, reĝo Sefi, estis la kontrasto de sia antaŭulo. Por la enviantoj de Ali nun la okazo estis favora pereigi lin. Ĉiutage Sefi devis aŭskulti la plej gravajn kulpigojn kontraŭ sia trezoristo kaj baldaŭ Sefi lin multe malfidis.

Iun tagon la reĝo deziris vidi belegan sabron, kiun reĝo Abbas iam donace ricevis de la turka sultano. La sabro ne estis trovebla, sed la altvalora donaco tamen estis sur la listo de trezoroj, kiujn Ali devis gardi. Ali kaj neniu alia malaperigis la sabron, Sefi opiniis. Kaj la korteganoj duobligis siajn kulpigojn kaj ili rakontis pri grandaj monsumoj, kiujn Ali elspezis, kaj ke li venis kiel malriĉa paŝtisto en la kortegon, dum nun lia domo estas lukse aranĝita.

Guste en tiu momento Ali envenis. Kolere la reĝo alkriis lin : „Trezoristo Ali, via nefidindo malkaŝiĝis. De nun vi estas eksigita el via ofico kaj post dek kvar tagoj vi devas prirespondi vian administradon.”

Ali restis trankvila, ĉar li havis puran konsciencon. Li komprenis, ke estus danĝere, se li atendus dek kvar tagojn por pruvi sian senkulpecon, kaj tial li diris : „Reĝo Sefi, mia vivo estas en via mano. Permesu al via sklavo unu favoron : konvinkiĝu jam hodiaŭ aŭ morgaŭ, kia estis la administrado super la ŝtataj trezoroj.”

Tiu ĉi peto estis tre bonvena al la reĝo, kaj jam la postan tagon li rigardis la trezorejon. Ĉio estis en bonega ordo; nur la sabro mankis. Sed Ali montris al la reĝo deklaron de la mortinta reĝo, laŭ kiu la multvalora sabro estis redonita al la sultano de Turkio.

Kaj Sefi hontis, sed lia malfido kontraŭ la trezoristo ne malaperis. Kun ia preteksto li akompanis la trezoriston al ties domo : li volis vidi la lukson, pri kiu la korteganoj parolis. Kun granda miro li rimarkis, ke ĉio estas tutalia ol oni prezentis al li. Simplaj tapiŝoj kovris la murojn; en la ĉambroj estis nur la plej necesa

meblaro. Sefi devis konfesi al si mem, ke simpla civitano el lia regno loĝas pli bone ol la ŝtata trezoristo.

Kaj duafoje Sefi hontis. Li volis foriri, sed unu el la korteganoj ekvidis ĉe la fino de la koridoro pordon, fermita per du grandaj rigliloj. La reĝo demandis al Ali, kion li gardas malantaŭ tiuj grandaj rigliloj. Ali ektimis kaj ruĝiĝis. Li tamen retranskviliĝis kaj diris: „Sinjoro, en tiu ĉi ĉambro mi havas la plej karan, kion mi posedas en la mondo, mian solan proprajon. Ĉio, kion vi vidis en mia domo, apartenas al la reĝo, mia sinjoro; sed la enhavo de ĉi tiu ĉambro estas mia propraĵo; sed — estas sekreto. Mi petegas vin, ne plu deziru vidi ĝin.”

La konfuso de Ali ŝajnis al la reĝo signo pri kulpeco. Lia malfido kreskis denove kaj li ordonis al Ali, malfermi por li la pordon. Ĝi estis malfermata kaj jen ekmontriĝis al la mirigitaj okuloj de Sefi nur kvar blankaj muroj, paŝtista bastono, fluto, modesta paŝtista vesto kaj sako; tio estis la trezoroj, sekuritaj per du grandaj rigliloj. Ĉiuj ĉeestantoj estis mutaj pro miro.

Kaj triafoje Sefi hontis. Tiam diris Ali modeste : „Potenca reĝo! Kiam la mortinta reĝo Abbas, via antaŭulo, min vokis for de miaj ŝafoj al la kortego, ĉi tiuj simplaj objektoj estis mia nura posedaĵo. Mi ĉiam konservis ilin kiel feliĉan memoraĵon el mia junaĝo. Kaj ĉiufoje, kiam mi bezonas inter miaj multaj okupoj, kuraĝigon kaj konsolon, mi retiras min en ĉi tiun ĉambreton kaj antaŭ la fenestro, rigardante al la kampoj, mi ludas per mia fluto la melodiojn kiel iam kun miaj ŝafoj. Via antaŭulo lasis al mi ĉi tiujn simplajn objektojn, ankaŭ vi estu tiom grandanima, potenca reĝo. Kaj permesu al mi reiri al la ŝafaroj sur la verdaj herbejoj, kie mi en mia malriĉeco estis pli feliĉa ol ĉi tie ĉe via kortego.”

Ali silentis. La ĉeestantoj estis ĝislarmede kortuŝitaj. La reĝo demetis sian superveston kaj pendigis ĝin sur la ŝultrojn de Ali kiel signon de sia plej alta favoro.

Reĝo Sefi ne lasis foriri sian fidelan, simplan serviston kaj neniu kortegano iam plu riskis diri malbonon pri Ali.

Kaj Ali longe vivis, honorata de ĉiuj. Kiam li mortis, la malriĉuloj same kiel la riĉuloj ploris sincere kaj ankoraŭ nun oni parolas en Persio pri la nobla, neprofitema Ali.

Trad. : VANE.

**Kiu nun abonas „L. J. V.” ricevos la junian numeron senpage.**

**Prof. Prel. A. DOMBROVSKI, pionoro en Litovujo,  
rakontas pri sia esperantistiĝo.**

Unu belan tagon en 1887 mi trovis en Varsovia ĵurnalo mallongan artikolon pri la nova internacia lingvo Esperanto.

Tiu simpla sciigo ne kontentigis la verkinton de la artikolo, kaj, dezirante esti sprita, li aldonis jenan rimarkon :

„La tutmondaj ŝtelistoj de nun povos uzi tiun novan interkompreniĝilon por siaj internaciaj celoj.”

Tiu moko de la ĵurnalisto efikis ĉe mi tamen tute alie, ol li deziris, ĉar la saman tagon mi aĉetis en Varsovio la polan eldonan de la unua Zamenhofa broŝureto.

Kiam mi tralegis la libron mi konstatis kun miro, ke mi bone komprenas tiun novan lingvon, preskaŭ sen plua lernado.

Pro tio mi tuj sendis al D.ro Zamenhof esperantan leteron, sciiĝante lin, ke mi ne intencas atendi, ĝis kiam la dek milionoj da homoj ellernos esperanton, sed decidis tuj ĝin komenci lerni kaj uzi.

Ĉar mi ne estis profanulo en la lingvo-scienco (mi ja konis tiam) 10 fremdajn lingvojn) mi komparis unu kun aliaj. Tiu ĉi komparo konvinkis min, ke Esperanto estas el ĉiuj la plej facila, belsona kaj la plej taŭga por ĉiuj branĉoj de la homa verkado.

Tiujn teoriajn asertojn akompanis mia esperantlingva persona laboro. Eldoninte mian „Versaĵareton” kaj du matematikajn broŝurojn, mi profunde konvinkiĝis, ke Esperanto vere indas fariĝi la tutmonda literatura kaj scienca lingvo.

Por mi persone ĝi estis lingvo, kiun mi volonte uzis por mia privata korespondado (dum 50 jaroj!) kun diverslandaj samideanoj (R. Georghegan, L. de Beaufront, E. Peltier, A. Grabowski, Cl. Colas, Bianchini kaj multaj aliaj) kaj scienculoj (profesoroj J. Boudier, C. Boulert, E. Lefèvre, C. Vörös. k. a.).

De D.ro Zamenhof mi konservas ĉirkaŭ 20 mallongajn negocajn leterojn.


Kiel juna entuziasmulo mi fervore profetis al li pri la plej brila sukceso de lia Esperanto. Sed li, en siaj leteroj, pri tio ĉi preferis modeste silenti.

Nur unu fojon, traveturante Varsovion, mi havis eblon persone viziti lin. Li min kore akceptis kaj ame gastigis per teo.

De la jaro 1906 ĝis nun mi faris preskaŭ nenion por Esperanto, ĉar longan tempon mi estis absorbita per la redaktado de la nacia litova ĵurnalo „Draugija” kaj malhelpata de miaj malsanoj kaj maljuneco. Kore vin salutanta.

(iom simpligita laŭ artikolo en „Litova Stelo”.)


## FORIRU.



For - i - ru, for - i - ru ne vo - las mi vin; al - i - ru al-



i - ru a - mu - zu do min. Fi - de ral - la - la - la Fi - de



ral - la - la - la - a - li - an mi ha - vas, pli ŝa - tas mi lin.

La geknaboj staras po pare en granda rondo vizaĝ' al vizaĝo. La knaboj formas la internan, la knabinoj la eksteran rondon.

1. Per levitaj manoj ili faras mallongajn gestojn.
2. Ĉiuj faras unu paŝon dekstren, kaj tiam staras antaŭ nova dancanto, kiun ili per amikaj mansignoj allogas.
3. Ili reciproke donas ambaŭ manojn kaj surloke ĉirkaŭdancas.

Amsterdamo (Ned.)

Trad.: KLATIL.

## KANTO DE LA GROET-TENDARO.

Inter dunoj orumitaj,  
Ĉe belega vasta mar',  
Kantas en amika rondo  
La tutmonda junular'.

En ripozo ĉerpas fortojn  
Juna korpo kaj anim'  
Ĉiujn zorgojn, vivobatojn  
Akceptadas ni sen tim'.

## REKANTAJO :

Junaj ni estas,  
Gajaj ni estas,  
Suno kaj luno ridetas al ni.  
Junaj ni estas,  
Fortaj ni estas,  
La estontec' apartenas al ni !

Junaj ni estas,  
Gajaj ni estas,  
ktp.

Riga (Latv.).

Ludm. JEVSEJEVA.

Ĉi ĉarman kanton ni ricevis por la junularkunveno en Groet. Sed, melodio mankas. Kiu povas helpi nin ?

**Por komencantoj.**

### LA POETO KAJ LA REĜO.

Antaŭ longe iu persa reĝo decidis verki poemon. Post multaj horoj de streĉa laboro ĝi estis preta. Li venigis sian kortegan poeton kaj petis lin prijuĝi la verkaĵon. La poeto estis honesta viro, kaj kiam li legis la reĝan rimaĵon li diris : „Reĝa moŝto, ĝi estas la plej malbona poemo, kiun mi iam ajn vidis.”

„Enfermu tiun azenon en la stalon, ĉe la aliaj azenoj!” kriis la reĝo furioze.

La servistoj plenumis la ordonon kaj gvidis la kompatindulon, kiu kuraĝis honeste diri sian opinion, al malluma stalo. Li devis vivi tie per akvo kaj pano, inter la blekantaj grizuloj kaj kaproj.

Post kelkaj semajnoj la reĝo opiniis ke la puno sufiĉas, do liberigis la malliberulon.

Intertempe li verkis alian poemon, kaj denove venigis la poeton.

„Mi verkis novan poemon,” li diris. „Mi laŭtlegos ĝin al vi. Diru vian oponion.”

La poeto atente aŭskultis.

„Nu,” demandis la reĝo, „kio estas via opinio? Ĉu ĝi estas bona aŭ malbona?”

La poeto silentis, sed kuregis subite al pordo, kiun li klopodis malfermi.

„Kien vi iras tiom rapide?” mire kriis la reĝo.

„Returnen al la stalo!” estis la respondo.

Al la reĝo, kiu ne estis malsaĝulo, plaĉis la stranga maniero, laŭ kiu oni montris al li, ke ankaŭ lia dua rimaĵo ne taŭgas. Li pardonis la poeton kaj estonte ne plu verkis poeziaĵojn.

#### **Respondu al jenaj demandoj.**

Kiu deziris verki poemon? Ĉu la reĝo ankoraŭ vivas? Ĉu la poemo baldaŭ estis preta? Kiu devis prijuĝi la verkaĵon? Ĉu la opinio estis favora? Kia estis la poeto? Ĉu li agis saĝe? Ĉu la reĝo ŝatis la opinion de la poeto? Kio okazis? Kiu plenumis la ordonon? Kien ili gvidis la kompatindulon? Kion li ricevis por manĝi? Kiu estis en la stalo? Kiom longe la poeto devis resti en la malliberejo? Kion la reĝo intertempe faris? Ĉu li denove venigis la poeton? Ĉu la poeto mem legis la poemon? Ĉu la reĝo petis lian oponion? Ĉu la poeto diris ĝin? Kio okazis? Ĉu la reĝo denove malliberigis la poeton? Ĉu la reĝo estis saĝa? Ĉu li iam fariĝis poeto?

**Vendu „La Juna Vivo” en viaj rondoj ponumere !**

## MALVARMA VINTRO.

(La barono de Munhhausen rakontas.)

Estis tre malvarme en Eŭropo, tiom, ke eĉ la suno ekhavis malvarmumon, de kio oni povas vidi ankoraŭ la makulojn sur ĝia vizaĝo. Ankaŭ mi multe suferis dum iu vojaĝo, kiun mi faris per poŝtkaleŝo. Kiam ni estis sur kava vojo, kiu ambaŭflanke estis borderita de altaj heĝoj, mi ordonis al la veturigisto blovi per sia trumpeto por ke neniŭ alia veturilo surveturu ĉi tiun vojon en direkto al ni. La viro obeis kaj blovis kiom eble plej forte, sed vane; li ne povis aŭdigi eĉ unu tonon. Tio ĉi estis neklarigebla al mi, sed ankaŭ kaŭzis prokraston, ĉar subite venis al ni veturilo, kiu okupis la tutan larĝon de la vojo.

Tuj mi desaltis kaj maljungis la ĉevalojn. Mi prenis la veturilon kun ĝiaj kvar radoj kaj miaj kofroj sur la ŝultrojn kaj saltis kun ĝi sur la apudan kampon trans la heĝon, kiu estis alta minimume naŭ futojn. Ne estis malgravaĵo, se oni pripensas kiom ege la kaleŝo estis ŝargita.

Per dua salto mi remetis la kaleŝon sur la vojon, sed nun malantaŭ la alia veturilo. Post tio mi prenis la ĉevalojn, sub ĉiu brako unu, kaj transigis ilin sammaniere al mia poŝtkaleŝo; ni ree jungis ilin kaj sen pliaj malhelpoj ni atingis la destinitan lokon.

Ankoraŭ mi forgesis diri, ke unu el la ĉevaloj, tre juna kaj vigla besto, preskaŭ faris al mi multan ĝenon; en la momento, kiam mi saltis trans la duan heĝon, ĝi ekbaraktis tiom forte per la piedoj, ke mi dum kelkaj sekundoj estis en embaraso. Ĝustatempe mi tamen metis ĝiajn du malantaŭajn kruojn en mian poŝon, kaj ĝi ne plu povis malhelpi min.

Ni alvenis en gastejo kaj la veturigisto pendigis sian trumpeton super la kameno kaj ni altabliĝis.

Sed aŭdu, kio okazis! — Tarata, tarata, tata, ta! — Jen la trumpeto mem ekblovis. Mirigite ni rigardis unu la alian kaj demandis nin pri la solvo de tiu ĉi enigmo. Estis tamen evidente. La tonoj estis frostiĝintaj en la trumpeto kaj ili degelis super la forno kaj elvenis fortaj kaj belsonaj, honore al la veturigisto; ĉar la instrumento havigis al ni dum duona horo belegan muzikon, sen ke oni devis enblovi.

---

Ĉiu, kiu varbos 2 abonantojn je „La Juna Vivo” donace ricevos la novan kantaron „L. J. V.”.

### LI POVIS PAGI !

Parvenuo : Kiom da dentoj vi faros en mia dentaro ?

Dentisto : Tridek du, sinjoro.

Parvenuo : Se vi volas, vi povas fari pli ol tridek du, ĉar mi povas bone pagi ilin.

### MEMORIGILO.

Profesoro : Mi ne povas kompreni, ke kelkaj homoj ne povas memori la naskiĝdatojn de siaj infanoj. Ili ofte eĉ ne scias, kiom-jaraj ili estas. Por mi tio estas tre facila. Mi naskiĝis 3000 jarojn post Sokrates, mia edzino 1800 jarojn post la morto de Tiberius Caesar, mia filo 2000 jarojn post la solena eniro de Titus Sempronius Graecus en Romo, kaj mia filino 1500 jarojn post la komenco de la granda popoltransloĝiĝo. Estas ja tre simple : Nur « rondaj » nombroj, ĉu ne ?

### LA FISOSTO.

Dum festmanĝo oni parolas pri esperanto.

Jansen, pasia esperantisto, asertas, ke oni en tiu lingvo pli facile esprimas sin ol en iu ajn alia. Subite li komencas eligi strangajn sonojn. Liaj tablo-kunuloj plenadmire rigardas lin.

„Ĉu tio estis esperanto?“ demandas unu, kiam la stranga sonfluo iom kvietiĝis.

„Ne,“ respondas la esperantisto spiregante, „fiŝosto!“

### SUR LA BORDO.

Promenanto demandas al fiŝkaptisto ĉu li bonŝancas.

„Mi ne plendas,“ estas la respondo. „Mi sidas tri horojn ĉi tie kaj kaptis ankoraŭ nenion.“

„Kiel vi do povas esti kontenta?“ demandas la promenanto. „Tri horojn, kaj kapti nenion!“

La viro montras en la direkton de alia fiŝkaptisto kaj diras : „Li sidis tie jam ses horojn, kaj kaptis nenion, do mi ankoraŭ bonŝancas!“



## LA FRANCO.

Germana kamparano lernis tiom pri la franca lingvo, ke li povis elparoli la vortojn, „oui” kaj „coquin”, kvankam li ne sciis la sencon... Ĉiam li praktikis la du francajn vortojn kaj pro tio liaj samvilaĝanoj donis al li la honoran kromnomon „la franco”.

Iam, en la tempo de Napoleono, li devis montri la vojon al franca suboficiro kaj ties trupo. Komence ĉio iris glate, tiom longe kiom la soldatoj interparolis kaj lasis lin antaŭiri kun la lanterno.

Kiam ili ridis, li kondukis, kvazaŭ li havas duoblan plezuron, por ŝajnigi, ke li bone komprenas ilin. Liaj samvilaĝanoj tiom ofte nomis lin „la franco”, ke li fine mem kredis tion.

La soldatoj rimarkis, ke li ridas pro iliaj ŝercoj kaj unu el ili demandis, ĉu li komprenas ilin. Nia „franco” kompreneble ne sciis, kion li demandas, sed li bone komprenis, ke oni faras demandon al li. Kaj sen pripenso li prezentis sian tutan scion pri la franca lingvo per la firma respondo : „Oui, coquin,” (jes, fripono).

Kun terura franca blasfemo la soldato tiris sian sabron el la ingo kaj svingis ĝin super la kapo de la gvidanto. „Kion, vi riskas ofendi francan soldaton,” li kolere kriis.

Kaj ree la kamparano flegme respondis : „Oui, coquin,” ĉar li ne volis malpliigi la impreson pri sia lingvoscio.

La suboficiro devis multe peni por ke la soldatoj ne frakasu la kapon de la gvidanto. Kaj por kontentigi la soldaton, li konsilis al la kamparano estonte pli dece respondi.

„Oui, coquin,” rediris la kompatindulo, kaj tiun ĉi fojon li ne eliĝis sen severa puno, precipe ne, ĉar la trupo venis en alia vilaĝo, kie oni perforte dungis alian gvidanton. Nia batita „franco” trenis sin hejmen.

„Ho, kian aspekton vi havas,” lia edzino ekkriis, „kaj kial vi revenas tiom frue?”

„Ah, tiuj viraĉoj ne toleras, ke oni komprenas ilin. Tamen ni havis kune multan plezuron, kvankam ili estas iom maldelikataj,” li fanfaronis. „Sed ili ne estas tiom krudaj, kiom vi opinias. Precipe, kiam oni povas bone respondi, kiel mi.”

Tion dirante li ŝveligis sian bruston, kvazaŭ li estis la plej granda lingvisto de la tuta mondo.

# ENIGMOJ

1.



e, e, e, e, e, e, l, o, o, o, o, o, o, r, r, r, r, r, t, t, t.

La vortoj signifas horizontale kaj vertikale :

1. skribaĵon; 2. facile vaporigantan fluaĵon; 3. ĉies nutrantinon; 4. parteton; 5. konsonanton; 6. vokalon.

T. Sv. MARTIN (Ĉ.S.R.)

D. VOJO.

2. Serĉu sep vortojn, tiajn, ke la lasta silabo de la antaŭa vorto, estas la unua de la sekvanta vorto. Ekz. : vorto - tolo — lotuso. La lasta silabo de la lasta vorto devas esti la unua silabo de la unua vorto, kiu ĉi tie estas : **loko**.

La vorto : loko (la vorto : loko!); 2a : parto de la homa korpo; 3a : floro; 4a : parto de skolta vestaĵo; 5a : monato; 6a : tualeta necesajo; 7a : kanto.

Inter la ĝustaj solvintoj ni lotumos 2 premiojn. Solvojn ni akceptas ĝis 15 julio.

## LA SOLVOJ EL No 9.

	boto
k t	doto
a r	foto
s t r a t o	koto
r u n t o	loto
l ĉ	moto
i i	noto
n l	poto
o o	roto
	voto

La premiojn gajnis : F.ino Dussart en Somain (Francujo); S.ro Stanimir Franc en Zagreb (Jugoslavujo).

## Internacia tendaro por instruistoj.

En Litovujo estos la venontan jaron, en la monato julio, 18-taga tendaro por instruistoj. La tendaron organizas gimnastika fako de Kleriga Ministerio, Palaco de Korpa Kulturo. Adr. : Kuno Kulturos Rumai, Kaunas Litovujo.

La ĉeĥoslovaka kleriga ministerio permesas esperantajn lumbildojn en la lernejo.

La ĉeĥoslovaka kleriga ministerio donis al lektoro H. Seppik el Estonio skriban permeson fari esperantajn lumbildparoladojn pri Estonio, kaj Svedujo en ĉiuj popolaj, mezaj, kaj fakaj lernejoj de la respubliko, kun la kondiĉo, ke la Esperanto-Asocio prezentos al la ministerio raporton pri ĉiuj tiaj prelegoj faritaj. La permeso estas subskribita de la ministro mem.

(Ankaŭ en Nederlando ni aranĝu fian propagandon ! — Red.)



## INTERNACIA JUNULARKUNVENO

### GROET (10-17 aŭgusto)

La internacia junularkunveno ĉie vekas aprobon kaj entuziasmon. Ĉiu faras sian eblon agrabligi nian restadon en Groet. Ĉisemajne ni ricevis leteron de amiko el Enkhuizen, kiu skribis :

„Se vi venos per aŭtobusoj al Enkhuizen, eliru en Bovenkarspel, proksimume du kilometrojn antaŭ Enkhuizen. En tiu vilaĝo troviĝas granda vendejo, kie oni tiam vendas bulbojn. La esperantistoj iru en tiun konstruaĵon, kaj se eble ricevos kelkajn bulbojn. Post tio ili iros en grandaj plataj boatoj, tirataj de motorboato. Tiel ni veturos laŭ la kampoj, kio precipe por eksterlandanoj estas vere interesa, kaj atingos Enkhuizen, kie ni en la mezo de la urbeto surbordiĝos.” — Vere estas brila plano !

Aldono al la programo : En la festvespero je sabato : Franca knabino, M. L. Stien, deklamos monologon.

Dimanĉon : Infangrupo el West-Graftdijk prezentos en dunvalo : „Kion la patro faras, tio ĉiam estas bona.”

Ĉiumatene ni komencos per dek minutoj da gimnastiko.

— El Nederlando ni ricevis kelkajn plendleterojn, ĉar multaj infanoj ŝatus partopreni, sed ne povas pagi 7,50 guldenojn plus la vojaĝkostojn. Kvankam nia trezorejo ne permesas al ni tro grandajn elspezojn, ni volas fari nian eblon kontentigi ĉiun. Pro tio ni diras : Se estas infanoj, kiuj nepre ne povas pagi la tutan sumon, skribu al ni. Eble ni povas malaltigi la kostojn.

En la venonta numero de la gazeto ni mencios, kion la partoprenantoj kunprenu.

Oni ankaŭ povas partopreni unu aŭ kelkajn tagojn. Anoncu vin antaŭe.

Kunportu flagojn kaj muzikilojn !

Denove ni instigas la legantojn vendi lotojn ! — Ni havas ankoraŭ 1200 !

Mondonacojn ni kompreneble alte taksas. Dek guldenoj validas almenaŭ cent, se oni elspezas ilin por infanoj !

### FINANCA RAPORTO.

Fino v. D. en Winkel : f 0,80; Sino M. en Wassenaar : f 5,00; S.ro Y en Batavia (Ned. Hind.) : f 1,00; J. M. en Purmerend : f 2,50; W. en Schagen : f 2,50; L. en 't Zand : f 2,50; A. B. en Koedijk : f 10,00; F. K. en Laren : f 5,00; B. W. en West-Graftdijk : f 5,00; W. v. d. H. en West-Graftdijk : f 0,40; L. en Purmerend : f 2,50; D. B. en West-Graftdijk : f 2,50; S.p. en Enkhuizen : f 2,50; A. B. en Spijkerboor : f 2,50; G. B. en Starnmeer : f 5,00; E. v. V. B. en West-Graftdijk : f 1,50; R. en Hago : f 1,00; G. B. en Koedijk : f 2,50; J. D. en Koedijk : f 2,50; H. P. v. B. en Zeist : f 1,00.

## 5-a LISTO DE PARTOPRENONTOJ.

**Anglaj knabinoj :** 111. Marjorie Ward (19), 112. Edna Maynard (18), 113. Kathleen Lewis (14), 114. Violet Hodges (18), 115. Brenda Cooter (15), 116. Francas Scriven (13), 117. Joyce Griffiths (13), ĉiuj en Tinkers Farm Lernejo, Northfield; 118. Marie Davies (17), 39, Garden City, Seven Sisters.

**Francaj knabinoj :** 119. Louise Bécu, 120. Fernande Dagneaux, 121. Josephé Delval, 122. Fernande Boez, 123. Paulette Lecerf, 124. Lucienne Debury, 125. Claire Dupuis. — La adresoj mankas, sed por korespondi oni povas skribi al la gvidantino: 126. F.ino Lepachelet, 13 Place Victor Hugo, Somain (Nord). La aliaj gvidantinoj estos : 127. F.ino P. Dubois kaj 128. F.ino Lecerf.

**Nederlandaj knabinoj :** 129. Jannie Bliëk (13), Wemeldinge (Z.); 130. Corrie Reilingh (9), Wemeldinge (Z.); la gvidantino estos 131. F.ino Gnirrep, Wemeldinge (Z.); 132. N. Kryt (15), Veeteeltstraat 156, Amsterdam.

**Nederlandaj knaboj :** 133. Joost Lijk (16), Dorpsstraat 89, Breskens (Z.); 134. J. de Kraker (17), Scheldestraat 30, Breskens; 135. Leen Ortelee (12), Wemeldinge (Z.); 136. R. Laguna (14), Nieuweweg 51, Laren; 137. C. Jansen (sama adreso) (15 jara).

Plue anoncis sin infrangrupo el Gouda, kiu venos kelkajn tagojn.

Ankaŭ anoncis sin plenaĝuloj el Anglujo kaj Francujo, por kiuj ni serĉis gastigantojn en la apuda vilaĝo Koedijk, aŭ mendis pensionon en Groet.



Denove la redakcio havas malĝojan novaĵon : Unu el la plej fidelaj kunlaborantoj, S.ino M. Jensen en Galtrup (Danujo) estis devigata transdoni sian taskon kiel reprezentino por „La Juno Vivo” en Danio. Kvankam ŝia sanstato jam dumlonge ne permesis al ŝi labori por „La Juna Vivo”, ŝi tamen daŭrigis fervore plenumi sian taskon.

Pro ĉio, kion ŝi faris, nian profundan dankon. Ni estas certaj, ke ŝi post sia resaniĝo denove eklaboros por Esperanto, ĉar ŝi apartenas al tiuj homoj, al kiuj la laboro por nia idealo, t. e. por la feliĉo de la estonta generacio, estas vivbezono.

Kara amikino, elkore ni deziras al vi : fartu bone !

**Atentu la daton sur la koverto je kiu via abono finiĝas(is).**



## LA JUNA VIVO VOJAĜO

AL SVISIO (24 julio-7 aŭgusto).

La redakcio ne bezonas plendi pri manko de intereso pri ĉi tiu vojaĝo. Ĝis nun, 16 majo, anoncis sin 28 partoprenontoj. Tamen, restas ankoraŭ sufiĉe da liberaj sidlokoj, ĉar ni sukcesis lui aŭtobuson kun 38 sidlokoj! Estas grandega veturilo kun tre forta motoro.

Kvankam la vojaĝo estas tre malkara, tamen estas fakto ke por multaj homoj 54 guldenoj estas tro alta sumo. Precipe la junuloj ne povas pagi tiom. Por ebligi al ili partopreni, ni proponas jenon :

Anstataŭ tagmanĝi en hotelo ili povas mem prepari sian manĝon. Ekzemple ili povas pretigi supon, kaĉon, pudington, fruktaĵon, ktp. Kompreneble la ingrediencojn por tiu tagmanĝo ili mem ne pagu. Ni pagas el la kaso. Kaj tiuj personoj pagu 44 guldenojn entute.

Precipe la junuloj povas profiti la okazon. Pliaĝuloj kutime deziras trankvile sidi en hotelo. Sed por junuloj la mempreparo de manĝaĵo havas apartan ĉarmon.

Ni kredas, ke ĉi tiu aranĝo plaĉos al multaj. Ni streĉe atendas la respondon de la legantoj.



## RICEVITAJ ESPERANTAJ

**TERMINARO HORKULTURA SESLINGVA, P. Neergaard.** — Esperanta-Angla-Dana-Sveda-Germana-Franca, kun difinoj en Esperanto. 32 paĝoj. Formato 13 × 7 cm. Prezo 0,35 hol. fl. ( 6,50 fr. fr.). — La verketo havas apartan valoron por vortaristoj kaj fakuloj, sed ankaŭ ĉiu amatoro de ĝardenkulturo trovas en ĝi la necesan vorto-trezoron, kiun eble vane li serĉis en la ĝeneralaj vortaroj de nia lingvo.

**INTERNACIA EŬĤARISTIA KONGRESO, Budapest, 25-29 Majo 1938, granda murafiŝo.**

**ILUSTRITA LERNOLIBRO DE ESPERANTO, Delfi Dalmau.** Nova eldono.

**STENOGRAFAJ GAMOJ.** Mallongaj tekstoj pri diversaj temoj por trafi stenografan rapidecon kaj ekzerciĝon por daktilografio, de A. G. Provost. Prezo 9 fr. fr. Ricevebla ĉe : Stenografika Instituto Tutmonda. 9, Boulevard Voltaire, Issy-les-Moulineaux, Seine, Francujo.

**BAPTO ĈE SAVICA, Tragika poemo.** Trad. Damjen Vahen. Grandioza verko de la slovena poeto D.ro Francé Preŝeren. — Belaspekta, ilustrita libreto. Eld. „Niaj Vizaĝoj”. Prezo : 0,60 guld. Mendebila ĉe „La Juna Vivo”.

**30-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO. Kongres-afiŝo.** Havebla de Internacia Esperanto-ligo, Heronsgate, Rickmansworth (Herts), Anglujo. Prezo : po unu internacia respondkuponon.

**FOIRO DE PARIS, Universala kaj internacia.** Afiŝo kaj ilustrita faldprospekto.

## KORESPONDADRESOJ

Ĉiu abonanto aŭ grupo havas la rajton enpresigi unufoje en la jaro senpagan korespondadreson ne pli grandan ol du linioj.

**Germanujo** : Esp. glumarkojn kaj vidaĵkartojn dez. interŝ. Alois Postl, Grazergasse N-ro 30, Hartberg, Stirio, Aŭstrio.

**Hungarujo** : La Hungara Skolto Esperanto-Rondo dez. kor. kun gejunuloj (prefere en : Japanujo, Finnlando, Azio). Budapeŝt, V. Nagy Sandor-U. 6.

**Hungarujo** : S.ro Kálmán Szabó, 21 jara, katoliko, dez. kor. kun eŭropaj k. koloniaj gejunuloj. Bálint Mihály-utca, 59, Győr.

**Jugoslavujo** : Mi dez. kor. kun fraŭlinoj pri amuzaj tempoj. Resp. certa. J. J. Marolt, Sokolska ul. 1, Maribos (19 jara studento).

**Latvujo** : F.ino M. Lielturģs, Riga, Brivibas gatve 11, dez. kor. per ilustritaj poŝtkartoj kun ĉiuj landoj.

**Nederlando** : S.ro Eddy Rademakers (21 jara instruisto) dez. kor. per il. poŝtk. kun ĉ. l. ges. roj. Pauluspolder, Vogelwaard (.).

**Nederlando** : K. E. K.-Esperanto-kurso nepre bezonas korespondantojn por komencantoj. Skribu al : S.ro J. Hagesteyn, Sekr., Duyststr., 20, Rotterdam.

**Nederlando** : 19 jara fraŭlino dez. kor. kun f.inoj en ĉiuj landoj. F.ino Dieuw van der Oord, Schermerhorn.

**Nederlando** : S.ro C. Schipper, Hem, H. 96, fraŭlo, dez. interŝ. il. pk. k. malgrandajn monerojn kun ĉiuj landoj. Resp. certa. Afr. filatele.

**Nederlando** : S.ro J. N. v. Weeren, Westlandsgracht 57<sup>1</sup>, Amsterdam (atentu la adresŝanĝigon) dez. kor. kun libristoj (precipe el malproksimaj landoj).

**Nederlando** : S.ro Jan Rozemayer, Zaandammerpad 22, Wormer, deziras korespondi kun ĉiuj landoj.

**Usono** : Esp. klubo Junior High School 171, 528 Ridgwood Ave, Brooklyn, N. Y., geknaboj 12-14 j., dez. kor. kun tutmondaj esp.-istoj, filatelistoj.

**Ned. Hindujo** : Stanislas Soeharta, Instruisto de Ignatia Lernejo, Pagaralam, Suda Sumatra, dez. kor. kun 16-30 jaraj gesamcelanoj en ĉ. l. pri edukado aŭ humora temo, interŝ. esperantaĵojn.

**Svedujo** : Klaskonsia laboristo dez. kor. kun gekamaradoj ĉiulandaj. Ankaŭ laŭvole interŝ. pm. Resp. certa. Kurt Strömberg, Ribersdal, Markaryd.



## SKRIBA KURSO DE LA JUNA VIVO

„LA JUNA VIVO“-skriba komenckurso (nur por holandlingvanoj). 16 lecionoj, lernolibreto kaj vortareto. Prezo 0,95 guld. Senpaga korektado.

„LA JUNA VIVO“-daŭrigkurso, preparante por diplomo A. 25 lecionoj, legolibro, historilibreto kaj amaso da buŝaj ekzamendemandoj. Prezo : guld. 1,90. Senpaga korektado.

(Sen korektado oni pagas por ambaŭ kursoj nur la duonan prezon.)

**ANONCETOJ (30 c. por ĉiu linio).**

**LUEBLA EN GROET** : Meblita domo „La Espero”. Loĝĉambro, granda kuirejo, 5 dormĉambroj. Adreso : S.ro L. Kok, Heereweg A 58, Groet (N. H.), Nederlando.

**LUEBLA EN GROET** : Meblita, nova domo, piede de la dunoj kaj apud la maro. Adreso : S.ro W. Bant, Lernejestro, Groet (N. H.), Nederlando.

**VOJAĜO NEDERLANDO-DANUJO.** Aŭtobusvojaĝo de Leeuwarden al Risskov kaj Ry en Mezjuto. Vojaĝtempo 27/7-11/8 '38. Biletprezo por la tuta vojaĝo : Leeuwarden-Hamburgo-Aarhus-Risskov kaj Ry-Hamburgo-Leeuwarden, do tien kaj reen, estas 16 nederl. guldenoj. Baldaŭa aliĝo estas dezirinda; ĝi devas okazi al : S.ro de Kat, Spoorstr., 142, Leeuwarden, kiu volonte donas ĉiujn informojn. Aliĝante oni samtempe ĝirpagu 6 guldenojn (ĝironumero 1460).

**SKRIBA KURSO POR A kaj B** (nur por holandlingvanoj). Tre detala B-kurso. Gvidanto S. Aarse. Petu senpagan prospekton. Ĉiu kandidato sukcesis. „La Verda Stelo”, Scheldestraat 64, Amsterdam-Z.

**IO TAGA ESPERANTO-RESTADO EN „RY”, DANLANDO, 31/7-10/8 '38.** Plena pensio 35-50 kronoj = 14-20 guld. Lastjare 160 partoprenantoj el 10 landoj. Senkosta prospekto ĉe H. Grönborg, Risskov, Danlando.

**MUUSSES ESPERANTO-BIBLIOTEKO.** Libretoj 32-36 paĝoj po 0,35 guld. Serio 10 volumetoj 2,50 guld. La enhavo interesa, instrua, bonstila, speciale taŭga por daŭriga kurso. Kursgvidantoj rajtas peti specimenon. Mendebila ĉe „La Juna Vivo”.

**GRAVA PREZMALALTIGO.** La binditaj jarkolektoj de „L. J. V.”, proksimume 200 paĝaj libroj, riĉe ilustritaj, kiuj antaŭe kostis po 80 cendojn, oni nun povas aĉeti por nur 35 cendoj plus afranko.

**INTERNACIAJ FERIAJ ESP. KURSOJ,** 16-24 julio '38 kaj **Internacia Ferio Esperantista, 12-15 aŭgusto '38,** en la intern. altlernejo, Helsingör, Danl. En 1937 210 personoj el 14 landoj. Prezo nur 19 kaj 22 fl. Ĉiuj esperantistoj bonvenaj. Karavano el Nederl., Francujo kaj Anglujo. Prospekto senpage ĉe S.ro L. Friis, Thyrasvej 15, Aabyhöj, Danl.

**30-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO EN LONDONO.** Tre alloga programo. Ĝis nun aliĝis al la kongreso 1235 personoj el 26 landoj. Sekretario : C. C. Goldsmith, Heronsgate, Rickmansworth (Herts), Angl.

**LA ESPERANTO-DOMO EN ARNHEM** kore invitas ĉiujn esperantistojn al somera libertempado kaj speciale al partopreno en la kursoj kaj aliaj aranĝoj: **Kurso pri la Esperanta-literaturo** (27-29 julio), kotizo 4 guldenoj. — **Vizito de dana karavano** (30 julio-8 aŭgusto). — **Seminario por Cseh-metodaj instruistoj** (1-6 aŭgusto), kotizo 6 guld. — **Ekzameno por Cseh-metodaj instruistoj** (6 aŭg.). — **Internacia perfektiga kurso** (8-13 aŭg.), kotizo ĉiuj lecionoj ktp. 6 guld.; komuna kotizo por la perfektiga kurso kaj seminario nur 10 guld. — **Esperanto-kurso por komencantoj** (10-20 aŭg.), kurs-kotizo 6 gld.

Adreso : Esperanto-Domo, Arnhem, Esperanto-laan 3.

**Subtenu la Internacian Junularlaboron !**

**AL LA ABONANTOJ, KIES ABONO FINIGOS JE 1 JULIO.**

Ĉiu, kiu pagis sian abonkotizon al „La Juna Vivo” antaŭ la 15a de julio '38 partoprenas en la lotumado, kiun la red. organizas inter la frupagintoj.

La premioj konsistos el Esperanto-verkoj, i. a. :

„Fabeloj de Andersen”, „Juneca Ardo”, „Krestomatio”, „Ilustrita Lernolibro de Esperanto”, „La Trezoro de l'Oraĵisto”, Bind. jarkolekto de „Niaj Vizaĝoj”, „Bapto ĉe Savica”, „Kantas la Hungara Skolto”, Esperanto-ludo : „Flirto Esperanta”. Plue bind. jarkolektoj de „L. J. V.”, lernolibretoj kaj kantaroj.

Pagu do vian ĵarabonon antaŭ **15 julio**, kaj vi havas la ŝancon gajni belan esperanto-libron !

En ĉi tiu konkurso ankaŭ rajtas partopreni la novaj abonantoj, kiuj pagis sian kotizon antaŭ la menciita dato.

**Nun la okazo do estas favora por varbi abonantojn !**

**ATENTU !!!** Tuj super la adreso sur la koverto ni presigis la daton, de kiam vi pagu vian abonkotizon. (Vidu la antaŭan numeron, paĝ. 159-160.)

**VIVO DE ZAMENHOF**  
(dua eldono)

Aŭtoro : Edmond PRIVAT

133 paĝoj, bona papero,  
12 ilustraĵoj.

Prezo : bind. f 1,75; bros. 1,25.

Aĉetebla ĉe „La Juna Vivo”.

**JARKOTIZO „LA JUNA VIVO”**

Argentino: 2 pes.; Britujo: 2 ŝil. 6 p.;  
Belgujo: 14 fr.; Ĉeĥoslovakujo: 17 kĉs.;  
Ĉinujo: 2 dol.; Danujo: 2,50 kr.; Estonio 2,50 kr.; Finnlando : 25 finn. Mk.;  
Francujo : 16 fr.; Japanujo: 2 jen; Italujo : 10 l.; Jugoslavio : 25 din.; Norvegujo : 2,50 kr.; Polujo : 3,20 zl.;  
Svedujo : 2,20 kr.; Svisujo : 2,10 fr.;  
Usono : 0,70 dol.

En landoj, el kiuj oni ne rajtas sendi monon eksterlanden, oni povas pagi per 7 respondkuponoj.

**UNUIĜO POR  
FREMDULTRAFIKO**

**La venonta internacia  
junularkunveno**

SENPAGAJN INFORMOJN  
PRI RESTADO. KTP.  
ONI PETU AL :

**V. V. V. „GROET-KAMPERDUIN”**  
Post Groet (N. H.)  
TEL. 423

Presejo A. Hessens, Bruselo.